

# esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 5 / 2012

Le Monde  
diplomatique

Bonan Datrevenon !!!  
Dek-jara kunlaborado

★ en Esperanto - eo.mondediplo.com

لوموند ديپلماتيک

法國世界外交論衡月刊中文版

Le Monde  
diplomatique



لوموند ديپلوماتيک

## Saluton Kara Legantaro !

Ĉi-jare, La monata ĵurnalo «*Le Monde Diplomatique*» estas tradukita esperante ekde jam ... 10 jaroj ! Bonan datrevenon kaj bonan daŭrontan kunlaboradon ! La teamo de «**Le Monde Diplomatique en Esperanto**» ricevis premion de la Internacia Esperanto-Asocio (IEA) el Nederlando (paĝo 4). La ĵurnalo estas tre fama en la tuta mondo : en 2012 oni nombras 47 internaciajn eldonojn en 26 malsamaj lingvoj; 38 presitajn eldonojn kaj 9 elektronikajn eldonojn, el kies la eldonon en Esperanto. La redaktantaro estas tute memstara. La reklama enspezo ne transpasu la 5 % de la tuta enspezo (kutime, la mezkvanto ĉirkaŭas la 40% !). La pasintaj artikoloj estas facile troveblaj surrete ( <http://www.monde-diplomatique.fr> ), kaj se ĝi plaĉas al vi, ne forgesu subteni tiun ĵurnalon ĉefe nuntempe ke la legantaro de ĉiaj ĵurnaloj ĝenerale malkreskas. *Le Monde Diplomatique* havas klarvidan kaj neordinaran analizon pri ekonomiko, pri la internacia situacio, ... Sia politik-analiza kompasu bone funkcias ... <http://eo.mondediplo.com>



Freŝdate, okazis interesa iniciativo dank' al **Valer Doumont** kiu organizis skoltan esperantistan renkontiĝon en Rosée (Valonio) je la komenco de Novembro. Ĝi bonege sukcesis, la etoso inter la partoprenintoj varmiĝis eĉ malgraŭ la pluva vetero !

<https://verdajskoltoj.wordpress.com/>

Kaj, kiel oni diras en la franca lingvo «cerise sur le gâteau» (ĉerizo surkuke), por fini tiun mesaĝon, ni deziras elkore saluti **Nikolin**, la fama kantistino en Esperantio kiu partoprenos al nia Zam'Festo la 15an de Decembro ! Plezure ni ĵus renkontis tiun viglan ĝojan fenomenon kiun ankaŭ gaje vivigos nian kunvenon per kelkaj kanzonoj !

Ĝis sabato la 15a de Decembro !

Laur' & Samy

[aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org)

## Enhavo

- Paĝo 3 :            Eventoj
- Paĝo 4 -> 8 :    Premio por «Le Diplo» en Esperanto
- Paĝo 9 - 10 :    Vojaĝo per biciklo (Cirilo kaj Roz')
- Paĝo 11 :         Promes-kampanjo de Vinilkosmo
- Paĝo 12 - 13 :   Rava muzika travivaĵo
- Paĝo 14 - 15 :   Poemo «Aŭtuna kanto» (Verlaine)
- Paĝo 16 :         Nova muzik-albumo de Patric
- Paĝo 17 - 19 :   IES en Cambrils, Kulturo kaj Turismo - Llba
- Paĝo 20 :         Novjara Festo en Greziljono





**K O L O F O N O**

36a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : [aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org) ;  
Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.

**Prezidanto** : Angelos Tsirimokos ; [prezidanto@esperantobruselo.org](mailto:prezidanto@esperantobruselo.org) ; **Kasisto** : Jan Amadori [jan.amadori@gmail.com](mailto:jan.amadori@gmail.com)

**Sekretario** : Laurent Loisse : [sekretario@esperantobruselo.org](mailto:sekretario@esperantobruselo.org) ,

**Abona membriĝo** : 10 eŭroj jare, konto **IBAN** : BE64 0000 1230 4852, **BIC** : BPOTBEB1 de la Esperantista Brusela Grupo

**Kunvenejo** : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono . **Informoj** : [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

**A G E N D O**

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org)

**Novembro**

<b>Sabaton la 24an</b>	<b>16:00-19:00</b>	<b>Esperanto-Kafejo en Loveno-la-Nova</b>
	<b>10:00-17:00</b>	<b>Malferma Tago Centra Oficejo UEA Rotterdam</b>
<b>Merkredon la 28an</b>	<b>18:30-20:00</b>	<b>Ĝenerala Asembleo de EBG</b>

**Decembro**

<b>Merkredon la 5an</b>	<b>18:30 - 20:00</b>	<b>Semajna kunveno / Kursoj</b>
<b>Sabaton la 8an</b>	<b>9:00 - 17:00</b>	<b>KuPro</b>
<b>Merkredon la 12an</b>	<b>18:30 - 20:00</b>	<b>Prelego de B-R Larue pri la fuŝaj tradukoj en nomoi de stratoj de Bruselo</b>
	<b>18:30 - 20:00</b>	<b>Semajna kunveno / Kursoj</b>
<b>Sabaton la 15an</b>	<b>11:30 - 18:30</b>	<b>Zam-Festo en Bruselo kun Nikolin</b>
	Nepre aliĝu ekde nun sur nia retejo aŭ telefone vespere al Nikolao 0478 382 981	
<b>Merkredon la 19an</b>	<b>18:30 - 20:00</b>	<b>Semajna kunveno / Kursoj</b>
<b>Sabaton la 22an</b>	<b>16:00-19:00</b>	<b>Esperanto-Kafejo en Loveno-la-Nova</b>

**Januaro**

<b>Merkredon la 9an</b>	<b>18:30 - 20:00</b>	<b>Semajna kunveno / Kursoj</b>
<b>Merkredon la 16an</b>	<b>18:30 - 20:00</b>	<b>Semajna kunveno / Kursoj</b>
<b>Merkredon la 23an</b>	<b>18:30 - 20:00</b>	<b>Semajna kunveno / Kursoj</b>
<b>Sabaton la 30an</b>	<b>18:30 - 20:00</b>	<b>Semajna kunveno / Kursoj</b>

**ZAM-FESTO en Bruselo !**

Ni rizervis je **sabato la 15a de Decembro 2012** por nia Zam-Festo (± **11:30-18:00**) la Kafetaron "**Kamilou**" kiu proponas tre variajn bongustajn manĝaĵojn biologikajn kaj faritajn el produktoj de la justa komerco. Ĝi situas ene de la "Domo por daŭrigebla disvolvo" je 300m de la metroo "Porte de Namur-Naamsepoort". **Cafétaria Kamilou**

**Rue d'Edimbourg 26 1050 Bruselo.**

Ni ricevos la faman kantistinon **NIKOLIN**, kiu estos akompanata de Laŭrenzo kaj lia gitaro. Se vi havas premio(j)n por la tombolo, bonvolu kunporti ĝin (ilin). Dankon !

**Nepre aliĝu ekde nun sur nia nova retejo ĉi tie !** [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org) aŭ telefone vespere ĉe Nikolao **0478 382 981**.





### **Nia „DIPLO” ricevis premion**

*En la marta numero de la revuo Esperanto aperis artikolo de Toon Witkam, kiu anoncis ke la Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago (Nederlando) atribuis al la skipo de nia Le Monde diplomatique en Esperanto premion, dotitan de du mil eŭroj, pro nia bona traduklaboro dum la dek jaroj de ĝia ĝisnuna ekzisto. En sia artikolo Toon klarigis la kvalitojn de nia gazeto. En mallonga artikolo ni aperigis en la sama revuo Esperanto niajn dankesprimojn, anoncante ke ni aperigos pli detalan klarigon pri nia laboro en nia gazeto mem. Ŝajnas al mi logike, ke la legantoj atendas nun de ni ion pli detalan pri la estiĝo, pri la funkciado, pri la problemoj kaj pri aliaj temoj de nia gazeto.*

de Vilhelmo LUTERMANO



Tiu premio surprizis nin duoble. Unue, ĉar ni ja kutimas laŭdojn, skribajn aŭ dicitajn dum ajnaj renkontiĝoj, kongresoj ktp, sed ĝis nun ni neniam ricevis oficialan rekonon de Esperanta institucio, des malpli kun materia helpo. Kaj due, tio konsciigis nin, ke ni fariĝas efektive dekjaraj. Diri precizan daton ne eblas, ĉar la estiĝo de nia DIPLO okazis dum la tuta jaro, dum almenaŭ kvar

punktoj, kiuj povus pretendi esti la fondiĝo de nia gazeto :

1. En januaro 2002 mi komencis ŝanĝi mian agadon. Dum jardekoj mi tradukis al Esperanto germanan literaturon, sed en tiu januaro, legante artikolon de la franca monatgazeto de politikaj kaj kulturaj analizoj *Le Monde diplomatique*, mi diris, kiel iam Berto Breĥto, „*Kia epoko, en kiu poemo pri arbo estas preskaŭ krimo, ĉar ĝi signifas silenti pri tiom da fiaĵoj*”. Kaj pli fie : la fiaĵoj estis ne nur kovrataj per silento, de la grandaj amaskomunikiloj, sed en granda mezuro eĉ glorataj. Ĉesis la funkcio de ĵurnalismo, iam konsiderata kiel la „kvara potenco” en la ŝtatoj, kiel ia kontraŭpovo, kiu kontraŭbalancigas la tri aliajn, la leĝdonan, la plenuman (iuj diras „ekzekutan”) kaj la juran. Anstataŭ plenumi tiun funkcion, ĝi fariĝis mensoga helpanto de certa politika tendenco kaj de la regantoj. Mi konstatis, ke la grandskala ĵurnalismo ne plu ludas sian rolon de korektanto de la tradicie tri demokratiaj potencoj. Do, en januaro 2002 mi tiris el tiuj konsideroj la konsekvencon : Mi ĉesis traduki literaturon kaj dediĉis min al tradukado de artikoloj el la franca *Le Monde diplomatique*, kiujn mi publikigis en mia privata retejo.



Kial ĝuste *Le Monde diplomatique* ? Ĉar tiu gazeto estas plurrilate altkvalita, kaj en tio unika. Ĝi estas referenca gazeto – ĉiuj ne evidentaj asertoj kaj faktoj estas provizataj per fontindikoj. En tio ĝi estas serioza kaj

fidinda. La skipo de ĝiaj aktivuloj – ĉiuj redaktistoj kaj laboristoj de la gazeto – estas sendependaj, ili mem „regas” sian propran gazeton laŭjure, laŭ aparta statuto. Tio estas unika en la mondo de komerca ĵurnalismo. Kaj la leganto povas malkovri el ĝiaj analizoj ian bazan principon : la vidpunkton, aŭ perspektivon, de la tuta homa socio – kaj ne de partaj intereso. En tiu senco ĝi estas progresema, alternativa. Ne estas hazardo, ke respondeculoj ĝuste de tiu gazeto estas ankaŭ la plej aktivaj iniciatintoj de la *Monda Socia Forumo* (MSF), kiu unue okazis en la brazila Portalegro. Kaj mi eĉ ne menciis la altkvalitan artan prezentiĝon de la gazeto, kiu en la reta eldono ja ne povas same efiki.

2. Post kelkaj monatoj da tia traduklaboro, mi petis la parizan redakcejon de la gazeto pri formala permeso traduki ĝiajn artikolojn. Miaj argumentoj estis interalie, ke la Esperantistaro parolas senescepte ĉiu ankaŭ alian lingvon – ofte iun, kiun la franca eldono aŭ iu ĝiaj alilingvaj versioj ne kovras – kaj ke la Esperantistoj estas plej ofte tre efikaj opiniobligantoj en sia nacilingva medio, en kiu ili povas disvastigi la enhavojn kiujn ili ricevis el Esperantlingva versio de la DIPLO. Sed mi eĉ ne bezonis argumenti, ĉar ili tuj respondis, ke ili jam pensis pri Esperanta eldono, ke ili do ne nur permesas la Esperantigon, sed eĉ volas fari kontrakton kun mi pri regula tradukado. Tiun kontrakton ni efektive subskribis en septembro 2002, la tiama direktoro de *Le Monde diplomatique* Ignacio Ramonet kaj mi kiel prezidanto de la Unesko-Grupo Narbonia kaj nome de tiu. La kontrakto temas, krom pri juraj aferoj, pri nia devo



aperigi ĉiumonate almenaŭ la ĉefartikolon, dum ni estas liberaj pri la ceteraj artikoloj, kaj pri nia rajto enmeti dudek elcentojn da artikoloj aliaj ol devenaj el la „gepatra domo”. Krome, la pariza eldono disponigas al sia Esperanta versio apartan retpaĝon.

Kiel okazis tiom Esperant-favora sinteno de la redakcejo de tiel mondfame konata altkvalita gazeto ? La redakcejo strebis jam dekomence havi kiom eble plej da alilingvaj eldonoj. Unu el la redaktistoj – temas pri s-ino Anne-Cécile Robert, kiu nuntempe respondecas pri la alilingvaj eldonoj, do ankaŭ pri nia Esperanta eldono, kaj kiu siatempe lernis la bazon de nia lingvo de sia patrino – iam proponis aperigi Esperantan version, kaj mallonge poste venis mia peto pri tradukpermeso. Do, mi venis ĝuste en la bona momento sur preparitan terenon ! Tamen ne eblas konkludi el tio, ke la tuta

redakcejo de la pariza gazeto estas tre favora al Esperanto. Ekz-e unu el la redaktistoj, plej konata interalie pro siaj aktivaj iniciatoj pri la Mondaj Sociaj Forumoj, Bernard Cassen, ja konscias pri la lingva problemo, sed li konstante proponas sian propran „solvon”, en artikoloj al kiuj sufiĉe multaj Esperantistoj reagis, interalie Claude Piron – tre bedaŭrinde lastfoje.

3. Post la oficialigo de *Le Monde diplomatique en Esperanto* iom post iom – unue en la somero de 2002 dum la UK en Fortalezo, Brazilo – aliĝis pluraj tradukistoj, kiuj tradukas ĉefe el la franca, sed kelkaj ankaŭ el aliaj lingvoj. Tradukadoj el aliaj lingvoj estas ja dezirindaj, ĉar certa kvanto de artikoloj estas originale verkita en aliaj lingvoj ol la franca kaj aperas en la franca eldono nur francigite. Por pli da fidelo al ilia



originalo estas bone traduki ilin prefere rekte el la originalo. Krome, la dudek elcentoj da artikoloj el aliaj fontoj venas ja ofte el aliaj lingvoj. Fine, nia retejo, kiun nia pariza „gepatra domo” disponigas al ni, plene ekfunkciis en la monato decembro de 2002.

Do, ni povas diri, ke dum la tuta jaro 2002, de januaro ĝis decembro, okazis la estiĝo de nia „DIPLO”, kaj ke ni festas nian dekjariĝon dum tiu ĉi tuta jaro.

Kaj kompreneble ni ne nur surpriziĝis, sed ankaŭ ĝojas pro tio, ke ĝuste tiu Esperanta institucio, kiu havas grandan tradicion pri instruado de nia lingvo, per la premio rekonas la valoron de nia laboro. Dankon, kolegoj de la Internacia Esperanto-Instituto !



## Celo kaj funkciado de la DIPLO

La eldonejo de *Le Monde diplomatique en Esperanto* estas la Unesko-Grupo Narbonia, kiu havas sian sidejon en Narbonio, do en la regiono de Narbono en la suda Francio. En tiu asocio membras ĉiuj regulaj redaktistoj tradukistoj de la DIPLO, kiuj kune decidas pri la diversaj funkcioj (ekz-e ĉefredaktisto) kaj eldonprincipoj, lingvouzo ktp.

La DIPLO havas ĉefe jenajn celojn : provizi la Esperantistojn per altkvalita, fidinda alternativa analizo de sociaj, politikaj kaj kulturaj aferoj – kun la espero, ke la Esperantistoj disvastigos la analizojn ankaŭ en sia nacilingva medio – , kaj krome : doni al ili ankaŭ lingve altkvalitajn

tekstojn. Al la ekstera mondo ĝi volas prezenti Esperantlingvan version de ĝenerale jam konata kaj tre alte taksata gazeto, do en tiu senco Esperanto povas profiti la bonan famon de la franca *Le Monde diplomatique*.

La ligo kun la „gepatra domo” okazas per regulaj jarkunvenoj de la tiel nomataj „internaciaj eldonoj”, prezidataj nun, kiel dirite, de Anne-Cécile Robert. Ĝis nun mi partoprenis trifoje en tiaj aranĝoj kiel reprezentanto de nia DIPLO, kaj nia kolegino Jeanne-Marie Cash unufoje. Dum tiuj renkontiĝoj la pariza eldonejo prezentas al ni siajn internajn diskutojn kaj decidojn, foje ankaŭ problemojn diskutatajn de ni, la Esperanta skipo, kaj ĉiu internacia eldonejo raportas pri la bilanco de sia lastjara agado, do kompreneble ankaŭ ni.

La DIPLO strebas esti lingve altkvalita. Tio signifas, ke ĝi estu

modela en pluraj rilatoj. Unue, kaj tio estas ja memkomprenebla, ĝi devas esti kiom eble plej senerara ĉiurilate. Krome, pro nia tutmonda legantaro, ĝi devas esti kiom eble plej facile legebla de la Esperantistoj el ĉiuj mondpartoj, ekzemple de francoj kiel de ĉinoj aŭ japanoj. Tio signifas, ke ni devas eviti fremdvortojn ĉiam kiam tio eblas, kaj ĝenerale uzi ĉiam la plej oficialan vorton, kiam ni havas le elekton inter du aŭ pluraj eblecoj. Niaj tekstoj devas esti tiaj, ke ili uzeblas ankaŭ kiel materialo en superaj lingvoinstruaj kursoj. Traduki laŭ tiuj principoj ne estas ĉiam facila afero, kaj eĉ pli intensa kaj temporaba laboro estas la kontrollegado de tradukitaj tekstoj.

Interesa estas ankaŭ retejo de la pariza eldonejo kun lingvolerna intenco, kiu

prezentas artikolojn en diversaj lingvoj, ĉe kiuj unuopaj sintagmoj estas en du lingvoj apudmetitaj. Unu el la unuaj kaj malmultaj lingvoj tie estas Esperanto. Tiu retejo, instalita de la franca „gepatra domo”, komencita en 2006 kun kelkaj entuziasmigaj laboroj, ŝajnas nun tamen stagni. Domaĝe, des pli ke tiu laboro estas relative simpla kaj farebla de kiu ajn Esperantisto, kaj ĝi eĉ ne postulas multan tempon. Jen la retejo :

<http://langues.mondediplo.net/>

Kiu ŝatus kunlabori por riĉigi tiun retpaĝon, tiu kontaktu nin pri tio. La tasko konsistas el diserigo de iu ajn artikolo – ekz-e de la ĉefartikolo – en frazpartetojn kaj apudmeti la koncernajn frazpartojn de la franca originalo.

### Ĉu ni havas sukceson ?

Ne mankas laŭdoj, kaj nun venis eĉ premio. Sed ĉu eblas mezuri la kvanton de la legantaro ? Nu, estas pluraj kriterioj. La unua estas tiu de la nombro de aliroj al nia retejo. Kompreneble, ne ĉiu aliro signifas, ke leganto aŭ legonto alklakis la koncernan paĝon ; kelkaj iras tien pro eraro, aliaj pro sciemo („kia aspektas tiu stranga lingvo ?”). Ĉiukaze, la plej multaj aliroj pruvas ian intereson aŭ pri la temo aŭ pri la lingvo. La kalkulilo de nia retejo cetere ekskludas la aŭtomatajn alirojn, ekz-e de serĉmaŝinoj ktp. Laŭ la aliroj, ni de la komenco konstante kreskis kaj havas nun – en 2012 – monate ĉirkaŭ 31.000 alirojn.

Alia kriterio por mezuri la sukceson estas la deveno de la aliroj, kiuj estas ĉe ni bone laŭspureblaj. Antaŭ nelonge la plimulto de la aliroj venis el la retejo de nia franclingva „gepatra” retejo. Sed nun, la vizitoj venas tre ofte el aliaj retpaĝoj kiuj havas ligan al

la nia, en la lasta tempo venos regule vizitoj el 25 tiaj retpaĝoj.

Interese estas la veno al nia retejo de legantoj el diverslingvaj versioj de Vikipedio, ekz-e el la franca kaj germana (kompreneble ankaŭ el la Esperanta). Tio estas certe instigo zorgi en la diverslingvaj Vikipedioj pri menciado de niaj artikoloj, kiam tiuj pritraktas temojn de koncernaj kapvortoj de Vikipedio. Tiu laboro fareblas de ĉiu ajn leganto, kiu havas minimuman sperton pri Vikipedio.



Eble plej interesa estas la ebleco rekte partopreni en diskuto pri aperinta artikolo. Ĉiu artikolo havas sub si butonon kun la demando „Kion vi pensas pri tiu ĉi artikolo ?”. Ĉe klako al tiu butono malfermiĝas paĝo por enskribi sian komenton. Kelkfoje legantoj uzas tiun eblecon por aldoni sian opinion, kaj plurfoje tiel okazas tie veraj diskutoj.

### La „DIPLO” kaj MAS

Cetere, legantoj de la DIPLO, kiuj volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi pri sociaj demandoj, fondis en marto 2005 ian etendiĝon de la DIPLO, la pure retan *Monda Asembleo Socia* (MAS). Pri ĝia etiko sufiĉas ĉi tie mallonge diri, ke MAS referencas la Universalan Deklaron de la Homrajtoj, en ĉiuj ties eroj. Cetere ĝi tradukis la poste sekvintajn deklarojn, kiuj iel detaligas tiun Universalan Deklaron. Temas ekz-e pri la rajtoj de la infano, kaj plej lasta-tempe pri la rajtoj de migraj laboristoj. Ili aperis libroforme en Esperanto kaj estas ĉiuj elŝuteblaj el la retejo de MAS.

El ĵurnalisma vidpunkto menciindas, ke ĉiu MAS-ano rajtas publikigi en la retpaĝo de

MAS ĉion ajn kion li volas, originale verkitan aŭ tradukitan. Kaj krome, li rajtas eldoni, en la eldonejo de MAS, ankaŭ ĉiajn siajn tekstojn. Tiel jam aperis pluraj libroj : la unua estis reeldono de rakonto „Aline” de la svis-franca verkisto C.F. Ramuz, en traduko de [René de Saussure](#), poste sekvis tuta serio de libroj de [Karlo Markso](#), pluraj infanlibroj, pluraj libroj pri la ekonomia krizo, pri la klimatsanĝiĝo aŭ protektado de la klimato, libroj pri plej diversaj temoj ... en la momento iras al la presejo la 83-a titolo. Kiu interesiĝas pri la titoloj, tiu povas legi ilin en la listo de ĝis nun eldonitaj libroj, kiun mi kunmetas fine de tiu ĉi teksto.

MAS, kune kun la redakcejo de la DIPLO, laŭokaze faras ankaŭ paperajn el-donojn, ekzemple por Universalaj Kongresoj aŭ por la Mondaj Sociaj Forumoj. Tiuj eldonoj aperas ĉiuj en formato pdf, tiel ke oni povas kopii la dosieron en formato A3 aŭ A4 kaj plej ofte samtempe en reala gazetforma papera eldono. Ili estas libere kaj senpage elŝuteblaj el la retpaĝoj de la DIPLO kaj tiu de MAS.

Aliaj projektoj – jam komencitaj – estas regula eldonado de artikolaroj, iuj en formo de papera gazeto, aliaj laŭtemaj kaj en formo de libroj, de materialo aperinta en la retpaĝoj de nia DIPLO kaj ĉe MAS. Materialo por tio intertempe abundas.

Cetere, la premio de la IEI estas akompanata de du mil eŭroj. Nia skipo jam decidis, ke tiu mono estu uzata por libroformaj eldonoj de laŭtemaj artikoloj de la DIPLO. Estus interese aŭdi, pri kiuj temoj niaj legantoj ŝatus legi libroforman kolektaĵon de niaj artikoloj.

Alia projekto estas aldoni, almenaŭ al la ĉefartikoloj, parolan formon de la artikolo en sondosiero, utilan por blinduloj, sed

ankaŭ por komencantoj. Helpontoj por ĉiuj ĉi projektoj tre bonvenas.

## Vi kaj ni

Fine mi ŝatus direkti al vi kelkajn petojn.



Unue : kapti la okazon por uzi la faritan laboron de *Le Monde diplomati-que en Esperanto* (kaj ankaŭ de MAS). En ambaŭ vi trovas riĉaĵojn uzindajn en Esperantujo. Uzado signifas ankaŭ ekz-e fari komentojn sub la artikoloj kaj parto-preni en eventualaj diskutoj pri ili.

Due : pripensi ĉu vi mem aŭ iu viaj konatoj povus partopreni en la regula traduklaboro de la DIPLO. Tiu laboro kuŝu prefere sur pluraj solidaj ŝultroj. Se okazas io grava al unu el la du plej laboremaj tradukistoj de la DIPLO, tiam, laŭ la nuna stato, la tuta afero ricevus tioman baton ke ĝi eble eĉ pereus. Kaj mi pensas ke valorus la penon de ni ĉiuj malhelpi tion.

Trie : instigi vin mem aŭ amikon okupiĝi, per tre malmulta laboro kiun ĉiu Esperantisto kapablas fari, pri la lingvolerna paĝo de la DIPLO. Sufiĉas rigardi tiun retejon kaj sciigi nin per retpoŝta mesaĝo pri via kunlaboremo, por ke ni zorgu pri pasvorta aliro ktp.

Kvare : Ni serĉas kunlaborantojn por helpi en kompilado, redaktado kaj / aŭ enpaĝigo de jam preta materialo por okazaj paperaj eldonoj de la gazeto kaj por libroformaj laŭtemaj kolektoj de artikoloj.

Fine : ĝuu la faritan, faratan kaj farotan laboron de nia DIPLO kaj, se vi sentas emon, ne hezitu partopreni ĝin.


Dankon.

Vilhelmo LUTERMANO.  
<http://eo.mondediplo.com>



# Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'

19/09/2008  
- 01/10/2008



## Francio

▷ Dum rapide proksimiĝas la noktiĝo en la Centra Masivo kaj falas la temperaturo, ni daŭre suprengrimplas sen trovi taŭgan lokon por tranokti. Estas malfacile starigi tendon kiam ĉiuflanke troveblas nur krutaj deklivoj. Ni fine trovas grupon de domoj kaj iu el ili havas ebenan herbejon flanke. La maljuna loĝantino permesas al ni tie tendumi kvankam ŝi videble timetas. Ŝi zorge ŝlosas sian pordon kaj fermas siajn ŝutrojn. Nur matene ŝi venos iomete babilu kun ni.

Intertempe, jam noktas kaj malvarmas. Dum ni stariĝas la tendon aŭtanta haltas por informi nin, ke li estas gastejon tri kilometrojn for. Li invitas nin... kontraŭ pago. Dankon ne. Kial pagi kiam eblas tranokti senpage? Kaj la tendon necesas amortizi. Kvankam la matena temperaturo proksimas  $-2^{\circ}\text{C}$  kaj prujno videblas sur la sakoj, ni eĉ sufiĉe kuraĝas por purigi nin je apuda fonto.

La deklivoj fariĝas pli kaj pli krutaj kaj montpasejoj sekvas montpasejojn. Biciklistoj preterpasas nin kaj iu krias al la aliaj "Vidu tiun frenezulon, ne nur li kunportas pezajn sakojn sed li ankaŭ kunportas edzinon"! Kvankam sunas, la vento malvarmigas nin. Vespere, meze de tiu malvarma montaro, iu agrokulturisto konsentas, ke ni dormu en lia garbejo kontraŭ la promeso ne fajrumi. Kvankam

ĝi plenplenas je grandaj pajlorulaĵo, ni sukcesas starigi nian tendon ene por eviti la pikojn de la multnombraj araneoj loĝantaj ĉi tie.

▷ Hodiaŭ, ni trapasas kvar sinsekvajn montpasejojn, la plej alta el ili je 1588 metroj. Ne tiom alte sed sufiĉe por trafi krutajn deklivojn kaj malvarmajn temperaturojn. Feliĉe, sunas en la malsuprendeklivo. Ankaŭ ĉi-flanke ni ricevas la permeson dormi en farmbieno, ĉi-foje sur betona grundo en granda stalo, apud malsana bovino deviga resti en varma "lito". Denove ĉi-flanke ni promesas nek fumi nek kuiri per gasvarmigilo.



Ni fine eliris el la alta parto de Centra Masivo. Post Aurillac ni denove ĝuas varman sunon. Por atingi la vilaĝon Conques, necesas suprengrimpi unu kilometron sur kruta deklivo sed tio valoras la penon, ĉar temas pri belega vilaĝo, etapo por pilgrimantoj survoje al Santiago, en Hispanio. En tiu sezono la loko tre agrablas ĉar turistoj pli malmultas ol en julio kaj aŭgusto kaj eblas pli libere promeni.

Ni proksimiĝas al Rodez, granda urbo apud kiu loĝas esperantistoj. Ili bedaŭrinde ne povos gastigi nin, ĉar ili foriras hodiaŭ. Ni ne sufiĉe rapidis en la montaro por alveni hieraŭ. Ni do plian fojon tranoktos sen ĝui varman duŝadon.

Nokte elirante el la tendo por urini, Cirilo rimarkas ke funkcias la malantaŭa lumĵetilo sur la Roza biciklo. Ĝi normale funkcias per dinamo sed la rado kompreneble ne

turniras. Rapida kontrolo montras ke ne videblas fluganta telero super niaj kapoj. La afero ne povas esti sed tamen estas. Nekompreneble! Cirilo malkonektas la dratfadenetojn de la lumĵetilo kaj la lumo malrapide malintensiĝas ĝis kompleta malapero. Roz' verŝajne ne kredos la rakonton morgaŭ.

Ni eliris de la granda montaro sen esti fororbitaj de eksterteruloj. Ni tamen daŭre trafas multajn deklivojn. Ni iam kredas trovi pli facilan itineron laŭ la rivero Tarno, sed post kelkaj ebenaj kilometroj ni repagas la konton per trafo de eĉ pli krutaj deklivoj, de 10 ĝis 13%!

En vilaĝo, eta piedpilka tereno atendas nin kun malŝlosita vestiĝejo. Ni eniras kaj trovas akvon. Ĉi-vespere ni facile purigos nin... per malvarmeta akvo. Eĉ estas senseĝa necesejo. Granda lukso! Ni povus instali niajn matracojn rekte sur la betono de la vestiĝejo sed kulo nervozige ĉirkaŭflugas nin dum ni manĝas. Ni profitas ke la interna ĉambro de nia tento estas memstara por uzi en la konstruaĵo. Plie, tio ebligas al la tendo plene sekiĝi post la antaŭa nokto en kampo.

La klimato multe pli agrablas. Ni nun troviĝas en suda Francio. Multe pli varmas, ĝis 25°C. Ni biciklas meze de vinberujaj kampoj. Estas tempo de rikolto sed kelkaj kampoj ankoraŭ ne ricevis la viziton de vinistoj kaj ni tiam povas ŝtelfrandi kelkajn berarojn.

(sekvena)







## Promes-kampanjo

Vinilkosmo esploras pli aktivan, partoprenigan kaj sukcesan manieron por produkti kaj eldoni novajn diskojn de Esperanto-artistoj, kaj invitas la muzikŝatantojn rekte helpi por decidi kiujn diskoprojektojn estu produktitaj kaj eldonitaj.

Pro tio Vinilkosmo decidis lanĉi ĉi tiun « Promes-kampanjon » en kiu estas prezentintaj diversaj eldonprojektoj kaj por kiuj homoj faru aĉetpromeson por povi ilin eldoni. Estos eldonitaj sur KD-oj nur la projektoj, kiuj ricevos la sufiĉan kvanton da aĉetpromesoj por kovri la produkto- kaj eldonkostojn. Se minimuma kvanto ne estos atingita la KD ne eldoniĝos, sed estos esplorita ĉu tamen sufiĉos por produkti la albumon nur por elŝutado en la VK-elŝutejoj.

Kompreneble se ne kolektiĝos sufiĉaj promesoj la projektoj ne aperos; tio dependos de vi kaj viaj deziroj.

Vi trovos, pere de ĉi tiu ligo

<http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo>, dokumenton por antaŭmendi la albumojn ĉu fizike (KD) ĉu elŝute laŭ formatoj mp3, ogg kaj flac. Sufiĉos indiki kion vi deziras precize elektante kiujn diskojn vi ŝatus ke estu eldonitaj.

Povas esti ke pliaj proponoj de aliaj artistoj alvenos intertempe tiam ni aperigos apartajn informojn kaj eventuale aldonon al la promeskampanjo.

**Por informo:** La unua disko de la kampanjo "**Okcitanio**" de **Patric** jam aperis kaj eblas rekte mendi ĝin ĉe la diskoservo ĉe [www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com) kaj elŝute mp3e aŭ ogge ĉe [www.vinilkosmo-mp3.com/](http://www.vinilkosmo-mp3.com/)

Krome nova albumprojekto aldoniĝis al la kampanjo, temas pri la brazila metala bando **baRok'** kiun vi povas jam tuj promese antaŭmendi !

Ni antaŭdankas vin pro via aktiva partopreno kaj subteno en la muzika eldonado.



*Plej muzike salutas Flo !*  
Nome de la Vinilkosmo teamo

### *Liste des projets de la campagne de 2012 à 2015 :*

- *-La Perdita Generacio - 3ème album (pop rock folk) pour 2012 (en préparation, sortie prévue décembre)*
- *-Amindaj de Cuba - 2ème album (traditionnel, musique des caraïbes, Salsa) pour 2013*
- *-Jak Le Puil - Nouvel album (chanson) pour 2013*
- *-JoMo - 4 ème album (pop rock-folk) pour 2013*
- *-Krio de Morto - Nouvel album (industriel-électro-métal) pour 2013*
- *-baRok' – 1er album – (Métal en Esperanto) pour 2013-2014*
- *-Kore - 3 ème album (piano-pop-chanson) pour 2013 – 2014*
- *-Jonny M (reggae) 1er album pour 2013 – 2014*
- *-Platano, de La Pafklik. 2 ème album (hip-hop / rap) pour 2014*
- *-Martin Wiese - 2ème album (Pop rock) pour 2014*
- *-Supernova – 2ème album (rock / Hard rock / métal) pour 2014*
- *-Dolchamar – 4ème album (électro pop-rock) pour 2015*



## Rava muzika travivaĵo

Gian Piero Savio

(el Israelo)



Magie sorĉis la ĉirkaŭa scenejo: dekliva arbaro en la ekstrema nordo de Galileo kun lebanonaj cedroj ŝajnintaj kiel teatraj kulisoj kaj ligna duetaĝa izolita konstruaĵo aperinta kiel sceneja fono. Sube, malproksime en la ebena, oni duonvidis tra la pluvego la lagon de Tiberias, iom pretendeme nomatan Galilea maro.

Tie loĝas fama piankoncertisto kaj konata muzikologo, kiu decidis frue forlasi sukcesan karieron kaj sin dediĉi al komponado kaj esploroj pri kordaj klavaraj instrumentoj. Ne tiom ofte li organizas en sia subtegmenta salono tre aprezatajn koncertojn por dudeko da elektitaj gastoj. Ĉifoje, pro la malbonegaj veterkondiĉoj nur ni kvar inter la invititoj fine sukcesis, ne sen kelkaj malfacilaĵoj, atingi la lokon.

Nia gastiganto, tute aplombe, gaje anoncis, ke rekompence por nia aŭdaco ni ricevos esceptan prezentadon. Kaj ... tiel ja estis: preskaŭ tri horojn de intima ludado sur tri kordaj klavaraj instrumentoj - klavikordo, klavikordo kaj piano - intermiksita per trafaj klarigoj pri ilia historio, evoluo kaj karakterizaj kvalitoj. Aparte interesa estis la ludado de samaj muzikpecoj per malsamaj instrumentoj.



Ĉu pro la loko, varma rifuĝejo meze de stormo, ĉu pro la natura akompano per bruaj ekblovoj de la ventego, ĉu pro la fascina prezentado de la gastiganto, vere temis pri ne forgesibla travivaĵo.

Tiamaniere mi malkovris kelkajn tiklajn kuriozaĵojn, pri kiuj mi deziras sciigi vin kiel eble plej malpedante.

Unue pri la klavikordo: ĝi estis pluka korda klavara instrumento tre populara en la jarcentoj de 16-a ĝis 18-a.

Malsame ol piano, klavikordojn ne

frapas marteloj, sed pinĉas plukiloj. Pro tio, sono de klavikordo estas mallonga, mallaŭta kaj malforta sed ĝia tembro kaj sonoreco estas neimiteblaj.



Kune kun la orgeno, la klavikordo estis la plej komuna

instrumento en Eŭropo ĝis la alveno de la piano, kiu plene trudanstataŭis ĝin. Tial la porklavarajn verkojn, kiujn Bach, Haendel kaj Domenico Scarlatti komponis specife por klavikordo, oni plenumis per piano.



Nia gastiganta muzikologo ludis per klavicenso la plej famajn muzikaĵojn de Domenico Scarlatti, itala klavicenisto virtuoza kaj komponisto el la 18-a jarcento. Unu el liaj plej famaj muzikaĵoj estas la sonato K175 en LA minora, kiun ni aŭskultis kaj per piano kaj per klavicenso.



Kaj jen mia dua malkovro: la klavikordo, ankaŭ ĝi klavara instrumento el la familio de kordinstrumentoj. Ĝis fine de la 18-a jarcento tiu ĉi instrumento estis disvastiĝinta preskaŭ en tuta Eŭropo. Kun la tendenco al sonfortigo ekde la komenca 19-a jarcento la klavikordo iom-post-iom eksmodiĝis. Komence de la 20-a jarcento oni remalkovris kadre de reekstanta intereso pri historiaj instrumentoj ĝian apartan ĉarmon, kiu baziĝas en la plej sensiva formebleco de la tono.

Tono de klavikordo estas relative mallaŭta, esence pli mallaŭta ol tiu de modernaj pianoj, tamen tre modulebla. Kiel ununura mekanika klavarinstrumento, klavikordo donas ja la eblecon influi la tonon eĉ post la ekfrapo, ekz. per tremado (t.e. perioda ŝanĝo de la premo sur la klavo). Surprize tio kaŭzas efekton similan al vibrado ĉe arĉinstrumentoj.



Ĝuste pro la relative rekta kontakto de la ludanto kun la sonanta kordo, kiu restas dum la tuta daŭro de tono, ludado de klavikordo postulas tre ekzaktan ludoteknikon: ludanto devas precize kontroli sian premon dum ĉiu sonanta tono, por ne estigi nevolajn efektojn.



Pro tio, nuntempe, dum ekzistas amaso da piankoncertistoj, estas tre malmultaj sufiĉe spertaj ludantoj de klavikordo. Nia gastiganto konfesis, ke nur nun post kelkaj jaroj de studado, li ekregas tiun ĉi fajnan instrumenton. Li ludis por ni sonaton,



fantaziojn kaj rondelojn de la plej fama komponisto por klavikordo, Carl Philipp Emanuel Bach, la dua el 20 gefiloj de la famega Johann Sebastian Bach.

Tiel, kun ankoraŭ la violona sonoreco de klavikordo resonanta en la oreloj, post preskaŭ tri horoj de aŭskultado, forgesinte pri manĝado kaj trinkado, nia travivaĵo en la klasika muziko atingis la finon.



<http://peranto.posterous.com/rava-muzika-travivajo>

Poemo

**Paul Verlaine**

Chanson d'Automne

Les sanglots longs  
Des violons  
De l'automne  
Blessent mon coeur  
D'une langueur  
Monotone.

Tout suffocant  
Et blême quand  
Sonne l'heure,  
Je me souviens  
Des jours anciens  
Et je pleure.

Et je m'en vais  
Au vent mauvais  
Qui m'emporte  
Deçà, delà,  
Pareil à la  
Feuille morte.




Aŭtuna kanto

La velksezon'  
Per violon'  
Ĝemo sona  
Vundas ĉel'kor  
Min per langvor'  
Monotona.

Sufoke nun  
Kaj pale dum  
Tintoj horaj  
Memoras mi  
Kaj ploras pri  
Tagoj foraj

Mi vagas, jen  
Zigzagas en  
Vento forta  
Kun svena fal'  
Simile al  
Branĉo morta.



Trad. Kálmán Kalocsay (1891-1976)

**Paul Verlaine**, estis franca poeto, naskiĝinta en [Metz](#) je la **30-a de marto 1844** kaj mortinta en [Parizo](#) je la **8-a de januaro 1896**.

La familio de Verlaine apartenas al la etburĝaro : lia patro same kiel tiu de [Rimbaud](#), estis armea kapitano. Li studis en Parizo kaj fariĝis dungito de la Urbodomo. Li frekventas la parizajn kafejojn kaj salonojn kaj en 1866 kunlaboras en la unua *Parnasse contemporain* kaj publikigas la *Poèmes saturniens*. Oni tie sentas influon de [Charles Baudelaire](#), dum jam anonciĝas "la strebo al Esprimado, al redonita Sento" (laŭ letero al [Mallarmé](#) skribita la 22-an de novembro 1866) kiuj karakterizas lian plej bonan poezion.





En **1869**, la *Fêtes galantes* (*Galantaj festoj*), fantaziaĵoj elvokante la 18-an jarcenton de **Watteau**, konfirmas ĉi orientiĝon. En 1870 Verlaine edziĝas al Mathilde Mauté por kiu li estas ĵus publikiginta *La Bonne Chanson*.

En 1871 **Arthur Rimbaud** aperas en lia vivo kaj perturbas la burĝan komforton en kiu li estis instaliginta. Verlaine forlasas sian edzinon kaj sekvas Rimbaud en Anglio kaj Belgio. Dum tiu vojaĝo li verkas *Romances sans paroles*. En 1873 dum disputo inter ambaŭ amantoj li vundas Rimbaud per du kugloj kaj estas kondamnita por dujara mallibero kiun li pasigas en Bruselo kaj Mons. Tie li ekscias ke lia edzino petis kaj atingis ke ili estu "korpe disigitaj". Verlaine tiam konvertiĝas al katolikismo : el tio fontas lia verko *Sagesse* (*Saĝo*). Elkarceriĝinte li denove iras al Anglio kaj sekve al **Rethel** kaj tie instruas.

En **1884**, li publikigas eseon pri tri « malbenitaj poetoj » (**Stéphane Mallarmé**, **Tristan Corbière**, **Arthur Rimbaud**) kiu kontribuas famigi lin. Kun Mallarmé, li estas konsiderata kiel majstro kaj antaŭulo de la **simbolistaj** poetoj kaj de la dekadentoj. De **1887**, dum li pli kaj pli famiĝas, li enfalas en la plej aĉan mizeron. Liaj lastaj literaturaj verkoj estas pure enspezigaj. En tiu tempo li pasigas sian tempon ĉu en kafejoj ĉu en hospitalo. En **1894**, li estas kronita « *Prince des Poètes* » (Princo de la poetoj) kaj ekricevas stipendion. Frue elĉerpita li mortis en Parizo en **1896** 52-jara. La tagon post lia entombigo, pluraj ĵurnaloj raportas strangan eventon : en la nokto post la entombigo, la statuo de la Poezio je la pinto de la Opero perdis brakon kiu falis kun la liro kiun ĝi tenis precize en la loko kie la funebra veturilo de Verlaine estis ĵus pasinta ...



**Kálmán Kalocsay** (6-a de oktobro 1891 en **Abaújszántó** – 27-a de februaro 1976) hungara Esperanta poeto, tradukisto, kaj redaktoro kiu multe influis la evoluon de Esperanto-literaturo kaj de la lingvo mem.

Kalocsay studis **medicinon** kaj poste fariĝis la ĉefa **infektologo** ĉe grava **Budapeŝta** hospitalo. Onidire li lernis kaj **Esperanton** kaj **Idon** adoleske sed ekkliniĝis al la unua kiam li vidis pli grandan potencialon literaturan. En **1921**, oni eldonis lian unuan originalan volumon poezian, *Mondo kaj Koro*. Plia jardeko pasis antaŭ la apero de lia kolekto *Streĉita Kordo*, kiun oni konsideras unu el la plej elstaraj kolektoj de originala **poezio** en Esperanto. Ankaŭ aperis *Rimportretoj* - spritaj rondelformaj poemoj pri pluraj tiamaj movadaj gravuloj.

Kalocsay gvidis la literaturan mondon de Esperanto pere de la revuo kaj eldonejo nomitaj *Literatura Mondo*. Kaj tiu grupo de verkistoj kiuj formiĝis ĉirkaŭ la revuo dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj, nomiĝis la **Budapeŝta Skolo**.

La verkoj de Kalocsay pri literatura kaj lingvisma teorio inkludas la ampleksan verkon *Plena Gramatiko de Esperanto*, kaj *Parnasa Gvidlibro*, ellaboritajn kun **Gastono Varingjeno**, kaj la pristilan gvidlibron *Lingvo Stilo Formo*.

Kalocsay kunverkis la du-voluman *Enciklopedio de Esperanto*.



## Apero de la unua albumo de **Patric** ĉe Vinilkosmo

Unika artisto, Patric estas unu el la plej famaj okcitanlingvaj kantistoj, kun kantaro kiu miksas popularajn okcitanajn kantojn kun adaptaĵoj de eksterlandaj sukcesaĵoj, kaj liaj propraj komponaĵoj. Komence de sia kariero, li kantis kun Georges Brassens, Barbara, Mouloudji, Claude Nougaro, Yves Duteil, Raimon, Lluís Llach, Pi de la Serra. Kaj Tom Paxton rekonis lin digna heredanto de la usonaj protestkantistoj.

En la UK en Montpellier en 1998, Patric allogis la esperantistan publikon, kaj denovan fojon okaze de la Franca Nacia Kongreso (IREM) en Sète en 2011. Post tiu kongreso naskiĝis la ideo pri albumo en esperanto uzante la kantojn de Patric tradukitajn en esperanton de André Andrieu, adaptitajn de Ludmila Novikova, kaj eldonitajn en Rusio en broŝuro titolita Okcitanaj kantoj en esperanto.

La albumo Okcitanio prenas dek kvin titolojn el la kantaro de Patric aperintajn en liaj okcitanaj albumoj; temas pri populara kaj tradicia okcitanaj repertuaro kaj ankaŭ propraj komponaĵoj.

Li akompanigas sin per ĉiuoriginaj altkvalitaj muzikistoj en ĵazo, tradicia, roko,




romaa, populara, salsaon, mondmuzikon, ktp. La projekto efektiviĝis laŭ la arta direktado de JoMo (Jean-Marc Leclercq). La korusaĵoj estis registritaj de korusa grupo de geesperantistoj el Tuluzo kaj Arieĝo.

Inter la elektitaj kantoj: la famega "Se canta" (Ĝi kantas) kara al okcitanoj, kaj "Kastelorizo", kanto dediĉita al lia forpasinta avino kiu estis grekino, precize de tiu eta greka insulo Kastellórizo.

Okcitanaj kantistoj Patric estas moderna trobadoro kiu vojaĝas tra la tuta mondo kun siaj kantoj. En 2013 li festos kvardek jarojn de kariero, sursceneja kaj diskara, kun jam dek ok albumoj, du DVD, kaj libro pri memoraĵoj kaj pensaĵoj.

Hodiaŭ estas la vico de esperanto per la apero de albumo Okcitanio interpretita de Patric en la universala lingvo. La albumo estas invito vojaĝi en Okcitanio, kaj komenciĝas en la Suda Stacio, kie oni povas aŭdi la mediteraneajn lingvojn (italan, hispanan, okcitanan) en la rekantaĵoj. Dek kvin kantoj kie miksiĝas tradiciaĵoj, personaj sentoj, koloroj, sonoj, kaj etosoj de Okcitanio.



## LA 20-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO de la 6-a ĝis la 13-a de oktobro 2012

Kutime la unua oktobra semajno estas rezervita por la tradicia E-aranĝo en Hispanio. La ĉi-jara jubilea 20-a E-Semajno okazis en la ĉemara urbo



“Cambrils”, situanta 16 kilometrojn sude de Tarragono. La aranĝon organizas grupeto da entuziasmaj esperantistoj el Barcelono kaj Sabadell sub la gvido de Luis Serrano Pérez. Dum la aranĝo li ankaŭ prizorgas libroservon.

Ĉi-foje la aranĝo atingis rekordan nombron da partoprenantoj. Alvenis 144 gesamideanoj el 13 landoj. Ni loĝis en granda 4-stela hotelo “Cambrils” en proksimeco de la plaĝo, kiu etendiĝas je 18 kilometroj laŭ la maro. Multaj profitis la posttagmezajn paŭzojn por promenadi laŭ ĝi kaj ankaŭ baniĝi en Mediteraneo. La vetero en tiu ĉi sezono estas ĉiam agrable varma. Ankaŭ la hotela naĝejo estis ĉiutage plenplena de hotelgastoj. La hotelo disponas pri 400 ĉambroj. Ĉiuj estis okupitaj. Oni aŭdis krom la franca, plejparte la rusan lingvon. Iuj gastoj scivolis pri Esperanto. Nia aranĝo estis la lasta de tiu-ĉi sezono dum kiu la hotelo funkciis. La prezoj estas malpli altaj ol dum la someraj monatoj.

La dimanĉan inaŭguron ĉeestis kaj bonvenigis nin la urbestro de “Cambrils” kaj aliaj du membroj de la urbestro.

Nome de UEA salutis la ĉeestantaron Barbara Pietrzak el Pollando. Ŝi pli poste prelegis pri la 125-a centjariĝo de la Unua Libro. La saman temon oni ankaŭ pritraktis en debato, kiun gvidis Luis Serrano. Ĉiutage (krom la tuttaga ekskurso) Rodica Todor el Rumanio animis kun granda sukcesola E-kurson. Pro ŝiaj profesiaj psikologiaj spertoj la kurso fariĝis interesa kaj sekvis ĝin multaj entuziasmaj lingvoŝatantoj. Ŝi eĉ havis ideon krei komunan libron pri la temo: “Kial restas multaj personoj ĉiamaj komencantoj kaj kiamaniere ni povus solvi tiun fenomenon?”. Gian Carlo Fighiera el Italio alloge prezentis la verkon de Victor Hugo “La Belulino, la Monstro kaj Nia Damo”. La geedza paro Michèle kaj Hubert el Belgio klarigis kiel plibonigi sian esperanto-lingvoscion per prelegoj. Per bildoj kaj komentario ili rakontis pri siaj spertoj en Esperantujo. Josée Boccadifuoco el Francio rakontis kortuŝan biografion de siaj gepatroj. Temis pri “Rememoro de milito”. Profesoroj Júrate Buŝiene kaj Aldis Buŝs el Latvio prezentis serion da prelegoj. Ili konigis al ni informojn pri baltaj landoj: Litovio, Latvio kaj Estonio. Pri sia lando ili montris film-fragmentojn el kultura kaj festa vivo kaj rakontis pri sistemo de instruado en Latvio. Krome ni eksciis kio estas hipofeo - planto kun oranĝaj beroj enhavantaj multe da vitamino C. Manfred Sona el Germanio enkondukis kaj klarigis interesan temon: “Baza enspezo senkondiĉa”. Ĝi estus bona rimedo por forigi malriĉecon kaj doni





kondiĉojn, por ke ĉiu povu vivi digne. Lia prelego instigis al vigla diskutado.



La prezidanto de HEF (Hispana E-Federacio) José Antonio del Bario rememorigis gravajn hispanajn esperantistojn de antaŭ la hispana intercivitana milito. Pro la ĉiutaga vespera hotela programo ne eblis okazigi kelkajn el niaj vesperaj programeroj.

Tial iuj gesamideanoj pli frue enlitiĝis, aliaj profitis dancadon, spektis flamenkan prezenton kaj magiaĵojn. Tamen ni ĝuis la du interkonajn vesperojn kun hispana "Cava" - ŝaŭmvino kaj ankaŭ vesperon kun "cremat" (bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj). Nur bedaŭrinde la folkloro ensemblo "Montjuic" pro certaj miskomprenoj ne venis ĝojigi nin per siaj kantoj. La hotelo provizis disko-muzikon kaj kontentigis nin per kelkaj havanaj melodioj.

La premio "Ada Sikorska" estis ĉi-foje



aljuĝita al Vilhemo Lutermano, kiu laboras por Esperanto. Li organizas retforumon MAS, redaktas Esperanto-version de "Le Monde Diplomatique" kaj eldonas E-librojn. Li loĝas en Kubo kaj pro tio li ne povis transpreni la premion persone.

Kutimaj (dum tiu ĉi aranĝo) estas unu tuttaga kaj du duontagaj ekskursoj. Dum la

unua duontaga ekskurso ni vizitis la E-muzeon en "Pau d'Ordal" kaj la vinkelon "Massana". Tie ni gustumis kaj povis aĉeti diversspecajn vinojn. La dua duontaga ekskurso celis la monaĥejon de "Escornabou". Ĝi estis plurfoje renovigita kaj nun servas kiel muzeo. Apuda rigardejo donis eblecon observi belan kaj vastan ĉirkaŭaĵon. La tuttaga ekskurso estis ĉi-foje iom nekutima. Unue ni vizitis planetarion en la urbo "Castelló". Poste atendis nin surprizo. Ĉiuj 90 ekskursantoj estis invititaj al la hispana specialaĵo "paella". Preparis ĝin je niaj okuloj s-ro Conejero en sia hejmo. La afabla akcepto fare de la familio estis por ni vere agrabla surprizo. Ni ankaŭ gustumis kelkajn fruktojn el la ĝardeno de la gastigantoj.



La Semajno estis sukcesa, la vetero favora, hotela manĝo abunda, la etoso gaja kaj amika. Koran dankon al niaj fervoraj organizantoj kaj kunhelpantoj pro la bona laboro, kiu ebligis al ni ĉeesti tiun ĉi ŝatatan aŭtunan eventon. Ĝis revido venontjare denove en Katalunio.

*Liba Gabalda*







**CAMBRILS**



**2012**



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



★  
NovJara Festo 2013  
Greziljono  
Grésillon

27/12/2012-  
02/01/2013

<http://gresillon.org/jarfino>

<http://gresillon.org/nouvelan>

